# EKO 2014-40: La dua tago de AMO

La marda sesio de la seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) en la 81a Itala Kongreso komenciĝis per grupdiskutado de la demando: 'Kiel konvinki la publikon, ke Esperanto estas vivanta lingvo?' Ĝi celis, kiel ni peru tiun minimuman mesaĝon al homoj ekster niaj ĉefaj celgrupoj. En ambaŭ grupoj, la diskutado centris tamen je manieroj turni sin al la pli verŝajnaj konvinkotoj en la publiko ('samideanoj, kiuj devas ankoraŭ lerni la lingvon') – t.e. niaj kutimaj varbaj taktikoj. La du publikoj tamen ne estas plene disaj. Stratbudo eble kaptos serioze la atenton de tri aŭ kvar homoj tiom, ke ili aperu ĉe kurso. Sed la budo havas la kromefikon, ke miloj da preterpasantoj rimarkis: 'Ha, Esperanto, ĝi do tamen plue ekzistas.'

Sekvis lumbilda prezentaĵo de Stefan MacGill, 'Kiel agi internacie', bazita sur lia multjara preskaŭ ekskluzive internacinivela laborado. Ĝi estis unue prezentita en la unua AMO-seminario en Hungario. Ĝi skizis la bezonon por internacia aliro al nia taskaro, listigis la oficulojn, kiuj devus povi labori internacie (inkluzive de iuj en Landaj Asocioj!), proponis principojn por tia laborado, prezentis la valorojn kaj riskojn de planoj, bezonatajn kvalitojn por teamestroj kaj teamanoj kaj fine prezentis la analizan metodon kiu en Esperanto ricevis la nomon FLAM.

FLAM estas akronimo por 'Fortoj, Lamaĵoj, Avantaĝoj, Minacoj'. Seminarianoj post la prezento tuj ricevis la taskon plenumi FLAM-analizon por tion persone sperti. Unu grupo plenumis tion pri la nuna stato de la itala movado; la alia faris samon pri la movado en Eŭropo: do la stato de la unuopaj Landaj Asocioj de UEA, Landaj Sekcioj de ILEI kaj TEJO, plus organoj kiel Esperanto-Centroj kaj la Eŭropa Esperanto-Unio. 'Fortoj' kaj 'Lamaĵoj' rilatas al la asocioj kaj movado: nome aferoj, kiujn povas ŝanĝi la esperantistoj mem. 'Avantaĝoj' kaj 'Minacoj' rilatas al prijuĝo pri la pli vasta socio en kiu la movado devas agi: nome aferoj, kiujn esperantistoj apenaŭ povas ŝanĝi aŭ eĉ influi.




La postpaŭza programo estis liverita de Amri Wandel, kaj konsistis el matematika provo taksi la nombron de Esperanto-uzantoj, surbaze de la statistikoj ĉe la socia retejo *Facebook*. Lia rezulto pli-malpli donas similan takson kiel aliaj fontoj, ekzemple de prilingvaj fakuloj kiel David Crystal. Por fini lian sesion, la seminarianoj eniris ankoraŭfoje du grupojn. Unu diskutis la eblojn kaj riskojn eluzi *Facebook* por Esperantaj celoj. La alia diskutis la rolon de Google, precipe ĝia tradukservo, kiu inkluzivas Esperanton inter siaj 64 lingvoj.

Pri la seminariaj tagoj ekzistas aŭ ekzistos pli detalaj tagaj raportoj, riceveblaj kontraŭ peto, kaj aperontaj en la renovigita retejo de UEA, tuj kiam ĝi estos publike lanĉebla. AMO-seminarioj havos sian paĝaron ene de la kategorioj: 'Agado > Kapabligo> Aktivula Maturigo'.

La seminario pluiras en ĵaŭdo, kun publika ferma kaj resuma sesio fine de vendredo.

## AMO en Azio

Ni ne planas raporti detale pri la seminario okazinta en Siano, Ĉinio, ĉar tio estas abunde prezentata en retejoj. Kiel jam anoncite, vizitu la retejon de El Popola Ĉinio: http://www.espero.com.cn/2014-08/20/content_33288616.htm

Nova ebleco: Vidbendoj de la AMO-seminario en Ĉinio aperis/as/os ĉe: http://www.youku.com/playlist_show/id_22782064.html.